

FLANDRA



KATOLIKO

MAANDSCHRIFT VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO VERBOND



Steeds

goede foto's!

Met de Gevaert Panchromosa film, 't brochuurtje "Fotografeeren bij kunstlicht" en de Gevaert Belichtingstabel voor Kunstlichtfoto's is U zeker 's avonds thuis goede opnamen te maken.



Deze twee Gevaert uitgaven zijn gratis in den fotohandel verkrijgbaar.

"CREDO"-AALST

FUKE-leden uit het Antwerpsche!

Voor uw

Heeren- & Kinderkleeding

GEMAAKT EN NAAR MAAT

is het beste adres:

J. PAESMANS

IN 'T DUIFKEN

Koepoortstraat 64, Antwerpen. - Tel. 217.51

5 % AAN ONZE LEDEN !!

**LIKEURSTOKERIJ
DE RAAF**

■ ALLE SPECIALITEITEN ■
ALLE GEKENDE WIJNEN

J. VANDEUN-JESPERS

TURNHOUTSCHE BAAN, 277
BORGERHOUT (ANTW.)

JAARGANG 4 (7)

Nr 3

JANUARI 1939

flandra  **katoliko**

Maandblad van het
Katholiek Vlaamsch
Esperanto-Verbond

K. V. E. V.

Monata Organo de
la Flandra Unuiĝo
Katolika Esperantista

F. U. K. E.

Redakcio: Patro C. v. Hoogstraten, O. Praem., Abatejo Grimbergen. (B)

Interŝanĝ-adreso: F. U. K. E., Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout.

Abonoprezio: 15 fr. Kun membreco FUKĈ kaj IKUE 20 fr. Abonoprezio por eksterlando 20 fr. P-konto 412.354 K.V.E.V. Aalst

FLANDRA UNUIĜO

DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ F. U. K. E.

Kath. Vlaamsch Esperanto Verbond K. V. E. V.

Voorzitter: Lic. Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst. **Ondervoorzitter:** Dr Marcel Naster, Naamsche straat 113, Leuven. **Proost:** E. H. A. Beckers, Professor, Normaalschool, Mechelen a. Maas. **Secretaris:** J. Van Deun, Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout. **Kassier:** K. V. E. V. Aalst, P-konto 412.354.

PROVINCAJ KAJ LOKAJ DELEGITOJ:

Antwerpen

ANTWERPEN
BONHEIDEN
BORNEM
EDEGEM
EKEREN
GEEL
HOBOKEN
MERKSEM
MOL
Ste MARIABURG
WILRIJK

E. Paesmans, Koepoortstraat, 64, P-konto 4145.89
Kapitano P. Vangeel
A. De Ridder, Boschkant, 1
R. Torfs, Verbindingsstraat, 9
Joz. Thijssens, Geesten, 72
M. Gordon, kleermaker, Statiestraat, 3
J. De Groot, onderwijzer, Caronstraat, 31
H. Versavel, Bredabaan, 785
F-ino M. Bergmans, Markt, 19
Joz. Cammaert, Van de Weygaardlei, 12, P-konto 4274.93
D. Mortelmans, E. Segerslaan, 14

Brabant

GRIMBERGEN
LEUVEN

E. H. Canisius van Hoogstraten, o. praem., abdij
Petro De Fraye, Kapucienenvoer, 75, P-konto 4427.19

Limburg

BREE
HASSELT

H. Beelen, professor, College
A. Tournel, Guido Gezellestraat, 5

Oost-Vlaanderen

GEERAARDSBERGEN
GENT
RUMBEKE

C. Bernaert, Pelgrimstraat, 1
M. De Valck, Meulestedesteenweg, 487
Maurice Tanghe

West-Vlaanderen

BLANKENBERGE
BRUGGE
KORTRIJK
LEDEGEM
LICHTERVELDE
OOSTENDE
ROESELARE

Fr. De Zutter, Wetstraat, 101
F. Roose, G. Gezellelaan, 15
P. Mattelaer, apotheker, Voorstraat, 40
F-ino Quagebeur, Statiestraat, 39
Kam. Ferijn, Wetstraat, 47
Maurice Hessens, Blauw Kasteelstraat, 86
H. Braekevelt, Statiedreef, 177

Alvoko al la katolikaj Esperantistoj

NI PREĜU KAJ NI ŜPARU!

En la jaro 1940 okazos en Nizza (Francujo) la XXXVa Internacia Eŭkaristia Kongreso kaj samtempe nia Dua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno.

Ĉiuj Esperantistoj kiuj ĉeestis la antaŭan Mondkunvenon en Budapeŝto kaj ankaŭ nian Unuan Eŭkaristian Esperanto-Mondkunvenon, neniam forgesos la grandan ĝojon, kiun ili sentis tie.

Tie ili efektive vidis, ke vere estas la Dia Providenco kiu gvidis kaj helpis niajn gvidantojn, en la entreprenado de tiu grava kaj signifoplena laboro.

Je tiu Kongreso Monsinjoro Ju-Pin, apostola Vikario de Nanking en Ĉinujo, proponis ke oni starigu Konstantan Komitaton por la Eŭkaristiaj Esperanto-Mondkunvenoj. Tiu Komitato jam ekestis kaj Lia Moŝto Monsinjoro D-ro Francisko Erdey, papa ĉambelano, fariĝis la prezidanto.

Ni flandraj katolikaj Esperantistoj, unue, ne forgesu ke tiu eminenta kulto al la Ĉiolejsankta Sakramento de l'Altaro ekestis en nia lando, kaj ke Lia Episkopa Moŝto, Monsinjoro Heylen, nia kara plej maljuna Episkopo, estas la Konstanta Prezidanto de la Eŭkaristiaj Mondkongresoj.

Due, ni ankaŭ ne forgesu ke pere de la mortinta sacerdota moŝto Eduardo Poppe, la Eŭkaristia vivo tiel progresis en nia lando,

ke ĝi transiris la limojn de niaj lando kaj kontinento, kaj akiris la tutan mondon.

Trie, ni memoru ke ni havas en nia lando multe da pilgrimejoj je honoro al la sankta Virgulino Maria, la Dipatrino, pere de kiu ni venas al la granda amo de Jesuo en la ĉiolejsankta Sakramento, de Jesuo Kristo, vera Dio kaj vera Homo.

Ni flandraj katolikaj Esperantistoj, ni infane amas nian Sinjorinon de Flandrujo kaj tial estas devo por ni, flandraj Esperantistoj, ĉeesti multope la venontan Eŭkaristian Esperanto-Mondkunvenon.

Alia kialo ankaŭ estas montri al niaj francaj gesamkredanoj, ke la katolika Belgujo multe ŝatas partopreni la tutmondan adoradon de Jesuo Kristo.

Certe FUKĈ faros ĉion por plifaciligi la vojaĝon al Nizza, ĝi ne estos multekosta kaj ankaŭ ne laciga.

Jam de nun do ni preĝu por ke nia Dua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno pli multe sukcesu ol la Unua, ni ĉiutage preĝu por tio kaj laŭeble komuniĝu por tiu celo.

Sed ankaŭ de nun jam ni ŝparu, ni ŝparu, ni ŝparu en ĉiu klubo.

Antaŭ nelonge aperis la Kongreslibro de nia Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno: ni havas tre belan kongreslibron kun ĉiuj paroloj kaj ĉiuj interesajoj de la mond-


kunveno. Tiu belega kongreslibro certe konvenas en la biblioteko de ĉiuj Esperantistoj ; ĝi formos kun la sekvontaj kongreslibroj belegan juvelon, pruvantan la progreson de nia movado.

Ĝi jam estas mendebla ĉe nia Vendoinsti-

tuto kaj ankaŭ ĉe mi. La prezo ne estos alta.

Kapitano Vangeel

Membro de la Konstanta Komitato de la Eŭkaristiaj Esperanto-Mondkunvenoj.



XXIIa I.K.U.E.-Kongreso

5-11 AŬG. ANTVERPENO 1939.

Honora Komitato. (Nekompleta.)

Prezidanto : Lia Eminenco Kard. van Roey, ĉefepiskopo de Mehelen, primato de Belgio. Membroj : S-ro R. Moyersoen, prezidanto de la Senato ; liaj Ekcelencoj la Episkopoj de Belgujo ; S-ro F. Van Cauwelaert, ŝtata Ministro ; S-ro Marck, Ministro de P. T. T., Trafiko kaj Radio ; S-roj Delwaide, Mampaye kaj Van Schuylenbergh, popolrepresentantaj ; S-ro Dexters, provinca konsilanto ; S-ro Maas, direktoro de Jamaycatabrikoj.

Loka Kongreskomitato.

Prezidanto : J. V. Deun, sekretario de F.U.K.E. Viceprez. : S-ro Prims. Sekretario : S-ro K. Hartman. Kasisto : Lic. L. Calloens, prez. de F.U.K.E. S-ro V. d. Bergh, por la loĝado. S-ro J. Thijssens, por la ekskursoj. Konsilantoj : Lic. L. Calloens, prez. de F.U.K.E. ; Prof. A. Beckers, rel. konsilanto ĉe F.U.K.E. ; Patro v. Hoogstraten, red. de « Flandra Katoliko », kaj D-ro M. Naster, viceprez. de F.U.K.E.

Kongresejo.

Ĉiuj kunvenoj okazos en la fama konstruaĵo « Concordia ».

Kongrestemoj.

La ĉeflema pritraktota kaj internacie priparolata estas : la katolika laborista junularmovado, ĝia esenco, evoluo kaj laborme-

todo. Kiel dua temo estas proponita : « Katolikismo kaj Rasismo », i. a.

Loĝado.

Sacerdotoj kaj monaĥ(in)oj ricevos gastigon en monaĥejoj. Izolaj sinjorinoj povas loĝi, je tre malalta prezo, en katolikaj institutoj. Oni provas akiri saman eblecon por izolaj sinjoroj. Laŭdeziro oni ankaŭ provos akiri loĝadon en privataj domoj. Hotelprezoj : en hotelo de tria klaso, loĝo kun manĝo : fr. 24.00 ; duona pensio : fr. 35.20 ; kompleta pensio : fr. 52.80 ; en hotelo de dua klaso, tiuj prezoj estas respektive : fr. 42.65 kaj 84 ; en hotelo de unua klaso, respektive : fr. 52, 75 kaj 100. Notu 5 fr. = 1 Belga.

Manĝoj.

Oni povas tre malmultekoste tag- kaj vespermanĝi en la konata « Restoracio Van Dijck », la hejmo de katolikaj unuiĝoj. Prezoj : tagmanĝo : fr. 6.75 (dimanĉe 7.50) vespermanĝo : fr. 5.50. Oni povas aldonigi antaŭ- inter- aŭ postmanĝaĵon por 3 fr.

Ekskursoj.

Provizore oni preparas jenajn ekskursojn : 1) boatveturadon sur la Skeldo ; 2) duontagan ekskurson al la ege vidinda malnova urbo Bruĝo (La Bela) aŭ al Lier-Leuven-Tervueren (eble ambaŭ samtempe okaze de sufiĉe da partoprenantoj) ; 3) tutatagan ekskurson al la Ekspozicio de Luik kaj al la famkonataj grottoj de Remouchamps.

Afiŝoj kaj glumarkoj.

Belaj trikoloraj afiŝoj estas eldonitaj kaj senpage haveblaj por tiuj kiuj povas elpendigi ilin en publikaj lokoj. La trikoloraj glu-

markoj kostas : por 50 : fr. 5 ; por 100 : fr. 9 ; por 500 : fr. 40 ; por 1000 : fr. 75. Mendeblaj ĉe la kongressekretario. La grupoj mendu pogrande. Oni povas pagi samtempe kun la kongreskotizo.

Kongreskartoj.

Kompleta kongreskarto kostas ĝis la fino de Aprilo 40 fr., poste 60 fr. Unutaga karto ĝis 30-IV. 15 fr., poste 20 fr. Dutaga karto ĝis 30-IV. 20 fr., poste 30 fr. Edzinoj de partoprenantoj kaj gejunuloj malpli ol 19-jaraj pagos la duonon. Ankaŭ blinduloj kaj senlaboruloj devas pagi nur la duonon. Al la senlaboruloj oni repagos ankaŭ tiun duonan kotizon se la donacoj ebligas tion. Helpkongreskarto kostas 25 fr.

Por ebligi al la Kongreskomitato, doni senpagajn kongreskartojn kaj restadon al la malriĉuloj kaj senlaboruloj, tiuj kiuj estas en bonstato bonvolu pripensi ke ili estas Kristanoj kaj faru donacon por siaj malriĉaj gefratoj.

Kiel aliĝi?

Oni aliĝas sendante la kotizon al tiu ĉi adreso : XXIIa Kongreso de IKUE, Erembo-degenstr. 29, Aalst, (Belgio). Eksterlandanoj pagu per internacia poŝtmandato, letero, se ne eble estas pagi al la poŝtĉekkonto 415.470.

Kiam vi aliĝas bonvolu laŭeble indiki sur la pagilo 1) kie vi deziras loĝi, 2) kie manĝi, 3) al kiuj ekskursoj vi intencas partopreni, por ke la LKK povu aranĝi ĉion ekzakte por la utilo de la kongresanoj.

Sekretariejo.

Por ĉiuj informoj, mendoj de afiŝoj kaj glumarkoj turnu vin al la kongressekretario : Potgieterstraat 1, Antverpeno.

La riĉa kaj interesa programo aperas en alia numero.

Een werklooze vroeg kosteloos logement gedurende het kongres. Degenen die kunnen helpen gelieven te schrijven aan de kongressekretaris : K. Hartman, Potgieterstr. 1, Antwerpen.



XXXIIa Universala Kongreso de Esperanto.

Bern, 29a julio — 5a aŭgusto 1939.

VENDREDO, 28a DE JULIO.

Malfermo de la kongresoficejo.

SABATO, 29a DE JULIO.

Akcepto en la stacidomo kaj gvidado al la loĝejoj.

Interkonatiĝa vespero, en la ĝardeno de Kursaal.

DIMANĈO, 30a DE JULIO.

Surmona diservo sur Gurten. Ĉe malbona vetero komuna diservo en la katedralo. Solena malfermo de la kongreso en la granda salono de Kasino.

Internacia kostum-procesio tra la stratoj de Bern.

Internacia kostumfestado en ĉiuj salonoj de Kursaal.

LUNDO, 31a DE JULIO.

Laborkunsido de IEL.

Fakaj kunsidoj, prelegoj.

Rondverutado tra Bern, aŭ gvidado en grupoj.

Festa prezentado de la « katedral-ludoj » subĉiela prezentado.

MARDO, 1a DE AŬGUSTO.

Laborkunsido de IEL.

Fakaj kunsidoj.

Gvidado tra la urbo.

Vespere, partoprenado ĉe la federacia fond-festo, en grupoj.

MERKREDO, 2a DE AŬGUSTO.

Tuttaga ekskurso al Jungfraujoĉ.

JAŬDO, 3a DE AŬGUSTO.

Laborĉunsido de IEL.

Ekskursoj : Ĉirkaŭ la Thuna lago, Al la Blauce, Al la Schwarzsee.

Dansvespero.

VENDREDO, 4a DE AŬGUSTO.

Takaj kunsidoj, prelegoj.

Ekskursoj : Trans la Pillon-pasejo, Trans la Jaun-pasejo, Sur la Chasseral, Trans la Schallenberg, Niesen-veturado, Granda transalpa-veturado.

SABATO, 5a DE AŬGUSTO.

Fermo de la kongreso en la granda salono de Kazino.

Gvidado tra la muzeoj.

POSTKONGRESAJ ARANĜOJ.

5a — 12a de aŭgusto :

LA HUNGARAJ SAMIDEANOJ PETAS VIAN HELPON.

ESPERANTO EN LA HUNGARA RADIO.

La 10-an de Decembro la fervora, entuziasma kaj celkonscie laboranta samkredano D-ro Vincze Toth (IKUE-ano), polickapitano kaj direktoro de la Esperanto Kulturpropaganda Instituto en Budapeŝt, ricevis la jenan leteron, kiu signifas novan paŝon al la rekono de Esperanto.

Budapeŝt, 9-12-1938.

Al sinjora Moŝto D-ro Vincze Toth, polickapitano, Budapeŝt.

Re pondante al via letero datita la 4-an de Dec. adresita al Lia Ekscelenca Moŝto Nikolao Kozma, nia prezidanto kaj ĝenerala direktoro, mi havas la honoron sciigi al vi, ke la Hungara Radio-Societo en la proksima estonteco prove envicigos en sian programon Esperantlingvan disaŭdigon.

Se tiu ĉi disaŭdigo havos tian eĥon ĉe la Esperantistaro, kiu postulas kaj necesigos, ke ni envicigu ankaŭ la lingvon Esperanto en nian laboron, la Estraro de la Radio-Societo akceptos por la efika uzado tiun ĉi potencon ilon estantan je ĝia dispono.

En la espero, ke la ĉi supra sciigo trankviligos vian Moŝton, mi restas

altestime via
D-ro Andreo Hlatky
Direktoro.

Do tiu ĉi anoncita elsendo estas nur prov-elsendo. Se ĝi havos grandan eĥon oni

Libertempejo en berna Superlando « Ni ripozu ».

Rondvojaĝo « Ni esploru Svislandon ».

Libertempa semajno en popolaltlernejo Herzberg.

Nia devizo : Ne pli promesi ol plenumi.

KOTIZOJ :

Ĝis 31-3 : Sv. Fr. 25 (175 belg. fr.)

Post 31-3 : Sv. Fr. 30 (210 belg. fr.)

ALIGILOJ haveblaj ĉe la sekretario de FUKO.

SKOLTA TENDARO.

En la Kongreso okazos la skolta tendaro 1939. Informojn petu de la fakdelegitino por skoltismo : F-ing G. Merz, Falkenweg 9, Bern.

daŭrigos regule Esperantlingvajn elsendojn. Tial, karaj legantoj, tio dependas de vi. Skribu multnombre leterojn aŭ almenaŭ poŝtkartojn en kiuj vi esprimas vian kontentecon kaj samtempe petas ke la Budapeŝta Radiostacio regule elsendu prelegojn en Esperanto. Tial ke Hungarujo estas katolika lando ne forgesu aldoni ke vi deziras ke oni elsendu precipe prelegojn por konatigi en la eksterlando la katolikan kulturon de tiu al ni kara lando.

Sekve de la alvoko de la komitato de la Unua Eŭkaristia Esperantomondkunveno evenis 525 leterojn. Tiuj leteroj bonege helpis kaj ankoraŭ nun en lasta tempo novaj sukcesaj paŝoj komenciĝis en la katolika Esperanto-movado dank' al tiuj leteroj. Tial komprenu, katolikaj Esperantistoj, ke vi povas helpi efike la katolikan Esperanto-movadon en Hungarujo, skribante karton aŭ leteron al la Radiostacio de Budapeŝt kaj samtempe petante katolikajn elsendojn en Esperanto.

La adreso estas : Direkcio de la Hungaro Radio, Sandor-u 7, Budapeŝt VIII.

Skribu tuj por ke vi ne forgesu !

Groene sterren om op uw correspondentie te plakken zijn verkrijgbaar op ons Verkoopinstituut.

Prijs 5 fr. per honderd

Esperanto op de Fransche scholen.

Ingevolge de mededeeling van het Ministerie van Nationale Opvoeding in Frankrijk, gericht tot de Academiebesturen (11-10-38) werden kort daarop reeds vele kursussen ingericht. De eerste mededeelingen melden kursussen in :

het district van de universiteit van Besançon, te Besançon in de Normaalschool voor jongens, de Normaalschool voor meisjes, Muloschool voor meisjes, Muloschool voor jongens, nationale school voor horlogemakers en het jongenslyceum ;

te Lons-le-Saulnier in het meisjeslyceum en de Normaalschool voor jongens ;

te Pontarlier in het jongenscollege.

Universiteit van Caen.

Te Rouaan in de hogere handelschool.

Universiteit van Rijsel.

In Boulogne-sur-Mer in de handelschool (2 kursussen voor meisjes).

Universiteit van Lyon.

te Villeurbanne in de Muloschool voor jongens ;

te Saint-Vallier in de lagere school.

Universiteit van Montpellier.

te Perpignan in de Muloschool voor jongens ;

te Prades in de Muloschool voor meisjes.

Universiteit van Parijs.

te Châlons-sur-Marne in de nationale technische school, de Normaalschool voor jongens, de Normaalschool voor meisjes, het jongenscollege en het meisjescollege ;

te Saint-Cloud in het jongenslyceum ;

te Versailles in een lagere school.

Universiteit van Poitiers.

te Brive in het jongenscollege ;

te La Rochelle in de Normaalschool voor meisjes ;

te Niort in het lyceum voor jongens en het lyceum voor meisjes ;

te Rochefort in het jongenslyceum en het meisjescollege ;

te Saint Léonard in de Muloschool voor jongens en de Muloschool voor meisjes ;

te Tours in de Muloschool voor meisjes ;

te Treignac in het jongenscollege.

Universiteit van Straatsburg.

te Mulhouse in het jongenslyceum.

Het getal kursussen zal nu echter reeds veel grooter zijn, waarschijnlijk zullen we dan ook in een van de volgende nummers

een nieuwe lijst kunnen laten verschijnen. De spoedige inrichting van deze kursussen, alsook de talrijke deelname bewijzen reeds voldoende dat men het in Frankrijk ernstig opneemt. Ofschoon Esperanto bijzonderlijk voor de kleine naties nuttig kan zijn, is het vooral in de landen met een « wereldtaal » dat men het nut van Esperanto op de scholen erkent, zooals in Engeland en Frankrijk en voor de overheersing van het bruine Boljewisme ook in Duitschland, waar het op circa 300 scholen onderwezen werd.

Ondertusschen blijft men in Vlaanderen maar roepen : leert « uw » Fransch !

Katolikaj Esperantistoj

jen taska por vi !

« Sed tio, kion mi volis diri, estas ke dum « la pasintaj dek tagoj ĝis nun mi ne komprenis unu vorton el tio, kion iu diris al mi. « Estas stranga sento, kaj iel iom absurde kaj « alimaniere iom teruriga. Iun fragmenton mi « iomete komprenis, pro la fakto ke mi ankoraŭ memoris pecetojn de la latina lingvo. Mi ne povas vidi, kial ni bezonas ian « Esperanton, kiam la Katolika Eklezio jam « faris Latinon la universala lingvo de la « mondo ».

(El artikolo « Tio memorigas min » de John Gibbons en la angla romkatolika gazeto « The Universe »).

La verkinto de la artikolo estas unu el la plej spertaj kaj ŝatataj el la anglaj katolikaj ĵurnalistoj. Li jam vojaĝis tra multaj landoj kaj skribis multajn tre interesajn kaj ĝuidajn vojaĝverojn. Inter ili estas « La vojo al Lourdes » kaj « Vagado tra Irlando ».

La unua parto de la artikolo priskribas liajn spertojn dum libertempo en fora montegara regiono en Portugalio. Kompreneble estas tre agrable, forlasi por iu tempo la radion, la telefonon, la gazetaron ktp. kaj tiel tute forgesi la malagrablajn de ĉi tiu ĝenraplena mondo, kaj ankaŭ la aferojn de la virmendoj. Tamen ni povas fari tion ne fariĝante mutuloj.

Mi tuj skribis al « The Universe » dirante ke multaj katolikaj pastroj, tiuj kompreneble scipovas minimume tiom da latina lingvo kiom S-ro Gibbons, tamen klare vi-

das la nepran necesecon de Esperanto. Mi menciis la nomojn de la ĉina Episkopo Jupin, de la hungara pastro Prof. Erdey, kaj de la itala patro Carolfi, kiuj fervore kaj praktike subtenas Esperanton. Mi ankaŭ priskribis la misian agadon de la Internacia Katolika Informejo kaj skribis pri la ekzisto de IKUE kaj ĝia gazeto «*Espero Katolika*».

La katolika Esperantomovado en Anglujo estas preskaŭ senviva. Malmultaj eĉ jam aŭdis pri la lingvo mem, kaj la gazetaro kaj pastraro estas aŭ indiferentaj aŭ kontraŭas la ideon de internacia lingvo krom la latina.

Do, mi petegas la katolikajn samideanojn, precipe la pastrojn, tuj kaj senhezite skribi al «*The Universe*» (plena adreso: 184 Strand, London W. C. 2) ke Esperanto estas mirinda kaj altvalora interkomprenilo por la aferoj en internaciaj kunvenoj, ekz. okaze de la venonta Eŭkaristia Mondkongreso en Nizza.

H. P. Saunders,

Konsulo de IKUE, Londono.

Ke tiu fama ĵurnalisto «*ne vidas kial ni bezonas Esperanton*» pravas, ke li ne bone scias kio estas la latina lingvo nek kio estas Esperanto; alie li ja komprenus ke la latina lingvo nur estas taŭga por esti «*preĝeja lingvo*» sed ne por esti parolita lingvo. Tial skribu al li pri tio kaj invitu lin veni al nia brila XXIa IKUE-kongreso, kie li konvinkiĝos.

La Landa Federacio de la Hungaraj Inventistoj,

ŝtate aprobita organizaĵo por defendi la inventistajn interesojn, jarkunvenis la 13-an de novembro en Budapeŝt. Elektinte prezidanto la dukon Jozefo-Francisko kaj honora prezidanto la universitatan profesoron Alberto Szent-Györgyi, ĝi unuanime decidis apliki Esperanton en sia eksterlanda korespondado kaj iniciati la fondon de Unio de Esperantistaj Inventistoj en la tuta mondo. La organizan laboron ĝi komisiis al sia direktoro Stefano Balint kaj al sia ĉefsekretario por eksterlandaj aferoj, eldonisto de Literatura Mondo, s-ano Vilhelmo Bleier. Membroj de la Unio povas esti ĉiuj inventistoj, ĉiuj patent-posedantoj kaj ĉiuj peristoj de patentoj. La celo de la Unio estas plifirmigi

la defendon de la patentoj en la tuta mondo kaj ebligi, ke la inventistoj trovu utiligantojn de siaj patentoj kiel eble plej multajn. La Landa Federacio de la Hungaraj Inventistoj jam tiucele ellaboris esperantlingvan liston de ĉiuj siaj inventaĵoj, kiujn la membroj posedas kaj disponigas ĝin al la organizaĵoj de la Unio.

Ĉiuj interesuloj en tiu fako povas skribi pri sia interesiĝo, notante, kiu parto de la laboro de la Unio ilin interesas, al la ĉefsekretario s-ro Vilhelmo Bleier, PARIS - XVII, 1, Rue Brey, Francio.

La organizata Unio deziras plej intime kunlabori kun la jam ekzistantaj gravaj esperanto-organizaĵoj kaj pri tia interkonsento la esperantistoj estos informataj.

Al la Tutmonda Esperantistaro...

Konsiderinte, ke la konstantaj nunaj barbaraj kaj glaciigantaj la sangon atakoj kaj pogromoj en Germanujo estis direktataj kontraŭ popolo, kies nura peko konsistas en tio, ke ĝi estas popolo juda,

konsiderinte, ke la plej sanktaj homaj rajtoj estas per tio je hontega maniero piedpremataj kaj ke la idealoj de homano kaj interpopola frateco elmokataj,

konsiderinte, ke la kreinto de Esperanto — D-ro L. L. ZAMENHOF — filo de juda gento, bataladis per la tuta forto de sia genia individueco por fratigo de ĉiuj popoloj sur bazo de neŭtrala lingva fundamento, — la VILNA ESPERANTISTA SOCIETO » UNIVERSO »,

vidalvide al la nunaj teruraj kaj brutalaj persekutadoj kontraŭ judoj en Germanlando, kiam niaj koroj sangadas kune kun ili kaj kiam niaj animoj estas plenplenaj je funebro kaj indigno, —

decidis

en naskiĝtago de D-ro L. L. ZAMENHOF, la 15-an de decembro, kiu estas por ni la simbolo de harmonia kunvivo inter ĉiuj popoloj,

sin deteni ĉi-jare de iuj-ajn solenaĵoj, esprimante tiamaniere sian plej akran proteston kontraŭ la profanado de homamaj sanktaĵoj.

Ni kredas, ke la tuta Esperantistaro (societoj, gazetaro kaj unuopuloj) ardege kun-

protestos en la nomo de l' interna ideo de Esperanto kontraŭ la kruelaj kaj abomenaj persekutadoj de senkulpaj homoj.

Vilna Esperantista Societo
«*UNIVERSO*»

Certe, ni ardege kunprotestas kontraŭ la kruelaj kaj abomenaj persekutadoj de sen-

kulpaj homoj, sed ne nur kontraŭ la persekutadoj de la judoj sed ankaŭ kontraŭ tiuj de la Katolikoj kaj Protestantoj. Kaj ni ne protestas en nomo de la interna ideo de Esperanto sed en nomo de nia Kristana amo al la proksimulo.

N. d. l. Red.

Esperanto-examens in Nederland.

In het afgelopen jaar hadden er negen examens plaats waaraan deelnamen:

voor diploma A: 284 kand. waarvan 223 slaagden;

diploma B: 63 kand. waarvan 47 slaagden.

Van die 347 kandidaten behoorden tot:

Nederl. Katolika: A 129 + B 23 = 152

Ned. Christ. Esp. Ver.: A 16 + B 7 = 23

Ned. Esp. Gruparo: A 10 + B 7 = 17

Andere Vereenigingen: A 24 + B 15 = 39

Niet georganiseerde: A 105 + B 11 = 116

Zooals men ziet is Nederlanda Katolika het best vertegenwoordigd. Toch is dat geheel in vergelijking met dat van 1937 met 60 verminderd.

Tot heden slaagden in Nederland in het geheel voor diploma A: 4810 en voor diploma B: 990 kandidaten, zoodat in Nederland 5800 Esperantisten een diploma bezitten.

Het examenkomiteit bestaat uit 10 leden. De afgevaardigde van de regeering is de

heer J. van Andel, Inspekteur van het middelbaar en gymasiaal onderwijs.

In 1939 zullen de volgende examens plaats hebben:

Op 6 Mei in den Haag, dipl. A en B.

Op 18 Mei in Alkmaar, dipl. A.

Op 18 Mei in Groningen, dipl. A en B.

Op 20 Mei in Heerlen; dipl. A en B.

Op 3 Juni in Bergen op Zoom, dipl. A en B.

Op 17 Juni in Amsterdam, dipl. A en B.

Op 4 November in Utrecht, dipl. A en B.

Op 18 November in 's Hertogenbosch.

De examengelden bedragen voor diploma A: 3 gulden voor hen die lid zijn van N. E. G.; N. K.; N. C. E. V.; L. E. E. N.; Fed. L. E. of N. O. S. O. B. E.; voor anderen 5 gulden. Voor diploma B is het respectievelijk 5 en 10 gulden.

Aanmelding voor de examens bij den sekretaris H. Bulthuis, Kamillestraat 37, Den Haag. Verdere inlichtingen te bekomen bij de redaktie van Flandra Katolika.

■ PENSO POR LA MONATO ■

Por atingi la pacon, unu el la plej necesaj aferoj estas prava pensado. Se ni bezonas pacon, necesas tenadi nian menson sendeturne al la paco kaj pensadi tiujn pensojn, kiuj antaŭenigas la pacon, — ekzemple, bon-

velo, kompato, pardonemo, toleremo. Ni povas ricevi ion ajn bonan, kion ni deziras, per tenado de nia menso kaj penso sendeturne al la Sola Fonto de ĉio bona. Tial ni certigu pacon per pensado pri la Aŭtoro de ĉio Paco.

H. T. Hamblin.

.. Rookt ..

JAMAYCA

DE FYNSTE DER SIGAREN

Rijke keus in cigarillos

Sigarenfabrieken JAMAYCA, Arendonk

(oni korespondas en Esperanto)



ESPERANTISTOJ!

Ciam konsultu por viaj vojaĝoj

«Ultra Montes»

La plej belaj vojaĝoj je la plej avantaĝaj kondiĉoj.

Ultra Montes, a. s. Antverpeno: 46

Korte Nieuwstr. Tel. 276 51 & 333 50.

Bruselo: Nieuwstr. 167. Tel. 17 53 44



APERIS :

NIEUWE ROMAN-SERIE.

Door de Federatie van Arbeiders-Esperantisten in het gebied van de Nederlandse taal wordt tezamen met S. A. T. (internationale socialistische Esperantovereeniging) een serie romans uitgegeven. We meenen het nuttig, hierover reeds op voorhand onze lezers in te lichten.

Het eerste boek van de serie is « Patroj kaj Filoj » door Turgenjev, in de vertaling van K. Bein. Deze roman beschrijft het leven in Rusland van voor 75 jaren. Turgenjev schreef een reeks schitterende novellen, doch de ondergrond van zijn werken is Hegeliaansch, pessimistisch en fatalistisch, en zonder het licht van de eeuwigheidsgedachte. Patroj-kaj-Filoj is voorbehouden voor gevormde lezers. (III).

Het tweede boek is getiteld « La Hispana Tragedio » van Jef Last, vertaald door G. Degenkamp. Jef Last was kapitein in het roode leger in Spanje. Hij schreef enkele verhalen en romans met socialistische tendenz, die zedelijk niet altijd in den haak zijn en soms zelfs godslasterlijk. La Hispana Tragedio is dus om die redenen voorbehouden en misschien zelfs verboden. (II - III)

Het derde boek heet : « Fontamara » door I. Silone, een antifascistisch schrijver van satyren op de toestand van de « cafoni », de armsten onder de bevolking in de Abruzza Fontamara. Dit boek veronderstelt meer dan gewone geestesontwikkeling en is streng voorbehouden, zooniet verboden. (We weten immers dat voor een socialist geen onderscheid bestaat tusschen fascist en katholiek ; een antifascistisch boek zal daarom ook gewoonlijk antikatholiek zijn). De vertaling is van Angelo en van Scheepen. (II - III)

Het vierde boek is het bekende werk van Latzko : « Homoj en Milito » in de vertaling van K. Minor. De oorlogsschetsen van Latzko vormen een spannend oorlogsboek. Homoj en Milito is voor volwassenen en veronderstelt buitengewone geestesontwikkeling. (IV)

Het vijfde boek « La griza Vilaĝo » door J. Toussoul, is een vertelling over het leven

van een mijnwerkersjongen in een Waalsch dorp. Minstens voorbehouden voor volwassenen. (III - IV)

De serie eindigt met het boek « Kulio » van Mevr. Skékely - Lulofs, in Esperanto vertaald door P. Makkinje. Deze roman beschrijft het leven van een koelie in een rubberplantage van Indonesië. Koelies worden dikwijls niet menscheijk behandeld en zijn dan echte slaven. Schrijfster van « Kulio » klaagt de wraakroepende toestand van de rubberkoelies aan, wat zeer prijzenswaardig is en ieder weldenkend mensch zal goedkeuren, doch ze doet het op een al te realistische manier, zoodat haar boeken (behalve haar laatste werk « Vizioen » wat bovendien het beste is uit litterair oogpunt) als verderfelijk moeten worden beschouwd en niet voor ontspanning mogen gelezen worden. (II)

BESLUIT : een serie romans die weinig opwekkends biedt en waarvan het eene boek meer dan het andere, om een of andere reden verderfelijk moet worden geacht. Katholieke Esperantisten besteden hun geld voor iets beters.

C. v. H.

Suplemento al la I. E. L.-Jarlibro.

La 31-paĝa suplemento al la jarlibro enhavas grandan nombron da aldonoj kaj ŝanĝoj en la delegitaro post apero de la jarlibro 1938, kaj la raporton de la Londona Kongreso.

Radioprogramo en Esperanto.

Tiu monata programo de la disaŭdigo de mallonga kaj mezlonga ondoj italaj, estas ricevebla SENPAGE ĉe Radio-stacio, Esperanto-Voĉo, Via Montello 5, Roma, Italio.

Dissendoj en Esperanto :
2RO (25.40 kaj 31.13 m) : lunde de 20.50 — 21.05 horo.

Roma II (245.5 m.) kaj IRF (30.52 m.) : sabate de 17.40 — 18 horo.

Interesuloj sin turnu al menciita adreso. Petu *regule* la programon en Esperanto !

Barbro kaj Eriko,

letera romaneto de A. Schneider kaj M. Carlsson. Eldona Societo Esperanto, Stockholm. Prezo 4 jr. 40 paĝoj, blanka bela papero. plaĉa aspekto. (V)

Ĝi estas korespondado inter du junaj ge-

esperantistoj, Aŭstro kaj Svedino, kiu estas originala instrumentodo eble uzebla por komencantoj, kvankam mi avertas ilin ke la gejunuloj faras erarojn. Se mi estus Eriko mi ne skribus tiajn banalajn leterojn kaj certe ricevus pli naturajn respondojn de Barbro. Nu, ne ĉiu naskiĝas kun talento de Mme de Sévigné. Ie kaj tie, kiam ili rakontas pri okazintaĵoj malgajaj, la banala stilo iom pliboniĝas.

Colo.

La Esperanto Klubo,

de Ernfrid Malmgren. Eldona Soc. Esper. Stockholm. 48 paĝoj. Prezo : 7.50 fr. (V N)

Tre taŭga libreto kiu pritraktas la demandojn : Kial fondi klubon ? Kiel fondi ĝin ? Kiaj estu la programoj ? Tre zorgita teksto kaj plaĉa aspekto. Ĝi multe helpas la novajn kaj eĉ la malnovajn lokajn grupojn por organizi kaj plivigli la kunvenojn, redakti la statutojn, modernigi la propagandon.

Colo.

Uitgaven "Die Poorte" 1938.

Nr 3. De doode waterval,

van Per Hallström. Roman. 182 bladz. — Prachtige omslag, keurig papier. (V)

Wellicht is Per Hallström, alhoewel behoorend tot de beste Zweedsche schrijvers van dezen tijd — hij is secretaris van de Zweedsche Academie — bij ons min bekend, dan bijvoorbeeld Selma Lagerlöf of Von Heidenstam.

Daarom hebben wij dankbaar dit boek in handen genomen en de kennismaking is werkelijk geen ontgoocheling geweest. De Skandinavische letterkunde is zoo veel frisscher dan de huidige Fransche of Duitsche literatuur bijvoorbeeld en nochtans hoogstaand van gehalte. De uitbeelding van Dolle Huss met zijn koppig doorgedreven plan om de Waterval uit te baten, en de tragische uitslag die hij bekommt na jaren lang de hoofden der boeren op hol gebracht te hebben of gestreden te hebben stil en gestadig, zelfs tegen de weerspannige liefde van Magnil, dit alles omweven met sagen en legenden, is boeiend weergegeven.

Een mooi boek van iemand die schrijven kan.

Nelo.

Nr 4. Het huis van 't Heilig Bloed,

door Marino Moretti. Roman. 230 bladz. — Prachtige omslag, keurig papier. (V)

Wat ons bij dit boek aantrekt is dat de Italiaansche schrijver zijn drama gedeeltelijk in Brugge laat spelen. Jammer genoeg is deze sympathie niet voldoende om zijn langdradige sufferijen en de onjuiste weergave van de atmosfeer van een Vlaamsch Begijnhof goed te praten.

Hier en daar komen wel enkele bladzijden voor die boeien kunnen maar het gegeven is te mager om er een hoogstaand letterkundig werk van te maken.

« Brugge door een vreemdeling gezien » kon men het wel noemen en als dusdanig is het wel n curiosum en 'n boek waarvan de lezing ons helpen zal de lange winteravondei op prettige manier te verdrijven. Nelo.

De boeken van « Die Poorte » kosten, met de reeks van 8 genomen, 10 fr. per stuk ; afzonderlijk genomen 16 fr. Bestelling en prospectus bij L. Calloens, Erembodegemstraat 29, Aalst.

VRAAGT EN LEERT

Nr 26. C. L. en St. A.

Zou het niet mogelijk zijn de meest gebruikte Esperantoafkortingen in een lijstje te publiceeren ? Ik denk dat het bij veel beginnelingen welkom zal zijn.

Antw.

anst = anstataŭ ; ekz. = ekzemple ; k. a. = kaj aliaj ; i. a. = inter aliaj ; k. c. = kaj ceteraj ; k. s. = kaj similaj ; k. sekv. = kaj sekvantaj ; k. t. p. = kaj tiel plu ; pĝ. of p. = paĝo ; t. e. = tio estas ; s. t. = sub titolo ; rim. = rimarko ; PS. of ps. = postskribo ; pm. = poŝtmarko ; sac. = sacerdoto ; kp. = komparu ; vd. = vidu ; d-ro = doktoro ; d-ino = doktorino ; f-ino = fraŭlino ; k-do = kamarado ; k-io = kompanio ; n-(r)o = numero ; prof. of p-ro = profesoro ; s-(r)o = sinjoro ; s-ino = sinjorino ; Mons-ro = Monsinjoro ; prez. = prezidanto.

Afkortingen die speciaal op de Esperantobeweging betrekking hebben zijn : I. K.

U. E. = Internacia Katolika Esperantista Unuiĝo ; E. K. = Espero Katolika ; F. U. K. E. = Flandra Unuiĝo Katolika Esperantista ; F. K. = Flandra Katolika ; I. E. L. = Internacia Esperantista Ligo ; U. E. A. = Universala Esperantista Asocio ; L. K. = Lingva Komitato ; U. K. = Universala Kongreso ; LKK = Loka Kongresa Komitato ; N. K. = Nederlanda Katolika ; F. L. E. = Federacio de Laboristoj-Esperantistoj ; FL. L. E. = Flandra Ligo Esperantista ; S. A. T. = Sennacia Asocio Tutmonda (internationale socialistische Esperantovereeniging).

No 25. C. L. en St. A.

Buitenlandsche uitgaven en dergelijken zijn dikwijls betaalbaar met « respondkuponen », antwoordkoepons. Wat beteekent dat?

Antw.

Internationale antwoordkoepons zijn koepons die op de postkantoren in alle landen, aangesloten bij de postunie, inwisselbaar zijn tegen postzegels ter waarde van het port, dat vereischt is voor een brief naar het buitenland. In België ontvangt men voor zulk een koepon dus fr. 1.75 in postzegels. Deze koepons zijn gemaakt om deze reden. Wanneer men een brief naar het buitenland zendt kan men er geen postzegel voor antwoord bijvoegen, daar die in het buitenland niet geldig is. Daarom geeft elk land op zichzelf koepons uit, waarvoor, volgens kontrakt, de postbesturen van andere landen postzegels afleveren aan de persoon die de koepons aanbiedt. Die koepons worden dan later door die postbesturen ingeleverd aan de postbesturen van de landen vanwaar ze herkomstig zijn, en die dan de waarde uitbetalen van de postzegels die ervoor geleverd zijn.

Die antwoordkoepons zijn verkrijgbaar op

NIEUW !

Met het oog op het aanstaande IKUE-Kongres gaf FUKÉ prachtige « Bromurite »-prentbriefkaarten uit over de stad Antwerpen. Gebruik slechts deze kaarten (met Esperantotekst) in uw correspondentie met het buitenland.

12 stuks in een étui : fr. 6 ; per stuk genomen : fr. 0.75. Te bestellen bij het Verkoopinstituut.

alle postkantoren, doch slechts op de grotere postkantoren zijn ze voorradig. Ze moeten afgestempeld worden op het kantoor waar ze afgeleverd worden en eveneens op het kantoor waar ze worden ingeleverd. Hun geldigheidsduur is beperkt. In België bv. aanvaardt men de koepons indien ze niet langer dan zes maanden geleden zijn afgestempeld ; in Tsjecho-Slowakije echter zijn ze maar drie maanden geldig.

Deze koepons kunnen natuurlijk niet alleen dienen als « postzegel voor antwoord » maar ook om kleine bedragen te betalen in het buitenland, vooral in die landen waarheen men moeilijk geld zenden kan. Ze doen dus dienst als papieren geld van geringe waarde, met dit verschil dat hun geldigheidsduur beperkt is en men bij de aankoop ervan meer betalen moet dan ervoor wordt teruggegeven. In België bv. kosten ze fr. 3.50 terwijl hun gebruikswaarde aanmerkelijk minder is.

Doch daar wij in België tot nu toe nog papieren geld hebben van geringe waarde, is het voor ons dikwijls gemakkelijker en voordeliger biljetten op te zenden van 5 of 20 fr.

Blankulo.



NOVAJ DELEGITOJ.

En Rumbek, nia ano, Sinjoro Maurice Tanghe akceptis la delegitecon de nia Unuiĝo por Rumbek. Ni esperas ke li faros fruktoplenan laboron en la tiea komunumo.

En Ekeren nia sindona ano, Sinjoro Joz. Thijssens, Geesten 72, Ekeren, estonte reprezentos F. U. K. E. en sia komunumo, anstataŭ S-ro Jos. Van Gulck kiu petis eksigon pro troa okupo.

Ni ĉi tie dankas nian malnovan amikon pro la laboro kiun li faris por FUKÉ kaj ni esperas ke kiel skoltestro li uzos sian influon por ke la skoltoj domu helpi manon dum nia IKUE kongreso.

Ambaŭ sinjoroj Tanghe kaj Thijssens estas bonvenaj en la estraro.

Katolika Esperanto Klubo el Ste Mariaburg

komunikas al ni ke sia religia konsilanto, Lia Sacerdota Moŝto Th. Bogaerts enoficiĝis kiel paroĥestro kaj ke la solena akceptiĝo okazis la 15-an de Januaro 1939.

FUKÉ kore gratulas Lian Sacerdotan Moŝton kaj esperas ke K. E. K. daŭre trovos en Li bonan religian konsilanton.

KURSOJ.

En diversaj lokoj ni ĝoje aŭdis pri malfermo de kursoj. Ni prientas niajn propagandistojn ke tio estas la plej taŭga kaj efika rimedo por antaŭeniri nian Unuiĝon. Tiun ĉi-jaron ni faris grandan paŝon kaj certe tio incitos multajn kompetentulojn fari same sekvantan vintron. La estraro estas ĉiam preta helpi ilin per trafaj afiŝoj kaj flugfolioj. Ili nur ilin mendu ĉe la sekretario.

BILZEN.

Sinjoro Dubois lasttempe faris meritplenan laboron. En Decembro pasinta li organizis kunvenon en Bilzen, kie li invitis kiel paroladiston, Sinjoro Filott el Heerlen, Nederlando. Granda ĉeestantaro plenigis la salanon, samtempe kiel diversajn parolvicojn ili aŭskultis la N. I. R. dissendon pri Zamenhof. pri kiu ĉiuj entuziasme parolis. Sekvis la informoj kaj enskribo por la venonta kurso, por kiu S-ro Dubois presigis 1000 flugfoliojn kaj aranĝis ekspozicion de Esperanta materialo. En Januaro li intencas starigi saman kurson por fraŭlinoj.

S-ro Dubois instruas per la rekta metodo kaj tiucele li faris 8 interesajn desegnaĵojn. Dum la unua parto de la leciono li nur parolas Esperanton kaj respondigas siajn lernantojn esperantlingve. La dua parto li dediĉas al la gramatiko.

Laŭ lasta enveninta letero li sciigis ke li havas grandan esperon enkonduki Esperanton en la tiea K. A. J. sekcio.

Ni deziras grandan sukceson al nia amiko Dubois.

SCHOTEN.

Komence de Decembro nia ano, Sinjoro Van Camp el Boom tie ekgvidis Esperanto-kurson por ĉirkaŭe 25 gelnantoj. Estas belego sukceso, despli ke en tiu komunumo nenam okazis simila kurso. Laŭ raporto lia la gelnantoj ĉiun semajnon kun kreskanta lernemeco laboras por akiri la konon de la

lingvo Esperanto. En escepta spirito de kunlaborado inter la gvidanto kaj la gelnantoj la Esperanto-lecionoj estas tiom da agrablaj vesperoj kiujn neniu volas manki.

Ni kore gratulas sinjoron Van Camp, kiu semajne kaj kuraĝe entreprenas la vojaĝon Boom — Schoten, kaj ni deziras al li grandan sukceson.

OOSTENDE.

Nia delegito, Sinjoro M. Hessens, ne kontentigis sin nur varbi 25 novajn anojn, sed ankaŭ organizis Esperanto-kurson por knaboj en Katholieke Volksbond, Stockholmstr. 7, Oostende. Tiu urbo nuntempe iĝas aktiva centro por nia movado, dank' al la senlaca laboro de S-ro Hessens, kies ekzemplo estas vere imitinda. Kvankam iomete malproksime de la kerno de nia agado, li kuraĝe daŭrigas siajn klopodojn kaj FUKÉ ŝuldas al li egan dankon. Antaŭen Oostende.

LIER.

Dank' al la klopodoj de nia tiea anino, Fraŭlino A. Bernaerts, komenciĝis kurso en tiu urbo. Sinjoro G. v. Den Bergh el Merkssem akceptis gvidi ĝin. Ni nur povas laŭdi S-ron V. d. Bergh, kiu krom sia merkreda kurso en Antverpeno ne timis eklabori ankaŭ en Lier. Fraŭlino Bernaerts presigis propagandcele trafajn afiŝojn kaj disdonis 1000 flugfoliojn. Ni ne dubas ke ŝi kaj la kursestro rekompensiĝos pro la senlaciaj penoj faritaj.

HASSELT.

Ankaŭ tie oni ne ripozas. Nia sindona delegito, S-ro Tournel, ekster sia prilaboro de la limburga gazetaro, komencis kurson en Handelsinstituut, Bampslaan 27, ĉiun lundon je la 17.30-a horo. Pro la taŭga preparo laboro ni ne dubas ke li spertos grandan sukceson. Plue S-ro Tournel estas sperta esperantisto kiu lerte gvidos la kurson je la kontenteco de ĉiuj siaj lernantoj.

EKEREN.

Kaj la serio daŭras. Estas nia delegito kiu en Davidsfonds-medioj sukcesis organizi Esperanto-kurson. Sinjoro Cammaert (kiu ankaŭ gvidas kurson en Ste Mariaburg nuntempe) afable akceptis funkcii kiel kursestro ankaŭ en Ekeren. Nu, konante la rezultojn de la antaŭaj kursoj de S-ro Cammaert el kiuj pluraj lernantoj bone pasis sian ek-

zamenon pasintjare, ni ne dubas ke denove en Ekeren li havos la samajn brilajn rezultojn.

Al ambaŭ Sinjoro Thijssens, organizinto, kaj S-ro Cammaeri, kursestro, ni deziras grandan sukceson.

ANTWERPEN.

Malgraŭ ke nia Unuiĝo jam organizis tri kursojn tie (1 daŭriga, S-ro Calloens, 1 por fraŭlinoj, Fraŭlino Maria De Rop, 1 por sinjoroj, S-ro G. v. den Bergh), nia ano, Sinjoro Karel Hartman en speciala medio ankaŭ sukcesis organizi Esperanto-lecionojn. Laŭ diroj de liaj lernantoj, la kurso agrable kaj glate funkcias kaj la gvidanto ĝojas pro la reguleco de siaj lernantoj.

FUKE kore dankas sian sindonan anon, Karel Hartman.

Ni inter krampoj, rimarkigas ke la kurso de S-ro Calloens en 1938 raportis bonajn fruktojn. Inter la kursanoj kiujn li instruis jam 4 gepartoprenintoj siavice nun instruas en diversaj lokoj. Li semis — FUKE rikoltas.

BONHEIDEN.

Ni fine menciu la belajn rezultojn de la aĝemeco de nia simpatia delegito, Kapitano Van Geel, kiu post parolado en Davidfonds starigis kurson kaj enskribis 20 gelnantojn, nombro kiu laŭ la lasta sciigo altiĝis. Kapitano Van Geel plenrajte povas fieri pri tiu rezulto kaj ankaŭ pro la unua vico kiun li akiris en la varbado de novaj anoj (22). Ni rapide rememoras ĉi tie ke Kapitano Van Geel estas la peranto de Regnum Christi por nia lando. Bonvole tiucele relegu sur paĝo 139, en la decembra numero de F. K. ĉiujn informojn rilate tiun periodaĵon.

Ni plenkore gratulas nian delegiton kaj deziras al li ĉian sukceson.

VOOR UWE

**Parketvloeren, Linoleums,
Meubelen en Marmers**
VRAAGT DE ALOMGEKENDE
BOENWAS GLIMO

Firma Corstiaens - Neefs
St-Antoniusstraat, 12-14, Antwerpen

EKZAMENOJ.

Ni priententis niajn kursgvidantojn ke ek de nun ili instigu siajn gelnantojn partopreni la ekzamenon kiun FUKE ĉiun jare organizas en Antverpeno je Pasko. Se eble ni ankaŭ klopodos fari same por Limburgo. Temas pri la Ekzameno A (10 fr.) kaj ekzameno B (20 fr.). Ni disdonas diplomojn por « La plej granda distingo », « Granda Distingo » kaj « Distingo ». Taŭgatempe ni sciigos la ejojn kaj datojn.

Honora Listo.

Jenaj personoj varbis novajn anojn dum la premio-periodo.

Kap. Vangeel : 22 ; M. Hessens : 21 ; A. Van Belle : 14 ; A. De Ridder : 4 ; Jos. Cammaert : 3 ; D. Mortelmans : 2 ; P. De Fraye : 1 ; M. De Rop : 1 ; J. Douwen : 1 ; Smets - Box : 1 ; la aliaj centoj kune 0 ! ! ! La unua ricevis, krom la ordinara premio, valoran libron.

GELA ESPERANTO GRUPO.

Nia progresema sekcio en Geel faris (antaŭ kelkaj monatoj jam) ekskurson al Nederlando. Tridek membroj kunvojaĝis kaj ĉiu el ili zorgis por amuzaj notoj. Kiel ĉiam oni jam kantis eĉ antaŭ ol ekvojaĝi. Unue ni vizitis Hasselt, poste Maastricht, kie ni, sub gvidado de afabla Maastrichta sinjoro, rigardis la plej belegajn vidindaĵojn. Posttagmeze ni vizitis Valkenburg, la grotajn kaj la katakombojn. Estis tre lerniga tago por ni. Dumvoje ni multe parolis Esperanton, kaj vespere tiuj, kiuj neniam parolis Esperantlingve, parolis kaj kantis kvazaŭ estus ilia kutimo, tiel montrante ke per kuraĝo kaj ekzerco ĉio estas ebla. Estis tago kiu restos dum longa tempo en nia memoro. (M. G.)

Katolika Rondo E-tista Mortsel.

La nova jaro dolore frapis nian prezidanton, S-ron Seghers, kiu perdis sian amatan patrinon. Ni prezentas al li niajn tutkorajn kondolencojn.

La aktivaj gemembroj daŭrigis kunveni ĉiuendrede sub la sinsekva gvidado de S-roj Laroche, Gilson, Verlinden kaj Lernout. Dume en apuda salono S-ro Vermuyten donas la lastajn lecionojn de elementa kurso. Ni esperas akiri post kelkaj semajnoj la kunlaboradon de 7 gekursanoj, kiuj sukcese restis sur posteno.

BIBLIOTEKO.

Novaj grupoj ŝatas havi bibliotekon por siaj anoj. Tio estas bona ideo, ĉar ne ĉiu komencanto-esperantisto povas tuj aĉeti librojn : li unue devas pagi la kurson, la klubkotizon kaj ankaŭ la FUKE-IKUE-kotizon. Kelkaj novaj sekcioj demandis al mi la titolojn de la plej taŭgaj libroj (facile legeblaj) por tiaj novaj bibliotekoj. Nu, mi konsilas jenajn :

Elektitaj Noveloj de Baekelmans, Formortinta Delsuno (Van Zon Zaliger), Vert-Vert (plej sprita, francdevena), Koro de E. de Amicis, La Floretoj de Sta Francisko (eventuala komparebla al flandra traduko), La Padova Lilio, Verda Koro, Infanoj de Betlehemo, El Diversaj Lingvoj (tradukoj el konataj elstarantaj libroj de la franca, nederlanda, itala, germana, angla, hispana lingvoj) kaj la historian romanon Fabiola. Alia rimedo por pliriĉigi la bibliotekon, estas partopreni la enigmokonkursojn de F. K. (Kompreneble ĉiu abonanto povas aparte partopreni por si mem). L. C.

KUNVENO FUKE-LKK.

La 27-an de Novembro okazis kunveno de FUKE-estraro kaj la LKK, en kiu ĉeestis Sinjoroj : Calloens, Naster, Prims, Van den Bergh, Van den Eynde, Thijssens, Claes, Mortelmans, Kapitano Vangeel, Frato Christiaens (v. d. Paters van Lavigerie) kaj fraŭlino Bernaerts. La sekretario igis sin senkulpiĝi, la vendestro anstataŭis lin. Post malfermo per la preĝo de Frato Christiaens, la prezidanto komencas per la IKUE-aferoj.

S-ro Calloens ricevis leteron de « L'Oeuvre Nationale des Aveugles Belges ». Ili dankas pro la informo ke la blinduloj nur devas pagi la duonon de la kongreskotizo.

Por raportoj en la gazetoj, ĉu flandralingve ĉu Esperante, tri personoj estos elektataj. S-ro Prims estas preta prizorgi tion. Ĉar laŭdire la Gazet van Antwerpen havas la Esperantoliterojn, ni provos akiri ke tiu ga-

zeto enpresas ĉiun tagon de la Kongreso, artikolojn en Esperanto en kelkcentoj da ekzempleroj. Ni mem zorgos ke ni havu disponeblan personon por korekti la presprevojn. (Pasintan jaron la Residentiebode enhavis ĉiun tagon tutan paĝon en Esperanto). Propono envenis pri invito de la reprezentantoj de la antverpena gazetaro al lunĉo.

Al la Kongreskomitato oni aldonis tri personojn kiel « konsilantojn » nome Pastrojn Beckers kaj van Hoogstraten kaj Dron Naster, tri kompetentulojn koncerne internaciajn kongresojn.

Oni preparolis la eblecon havi delegiton en la Universala Kongreso en Bern, kiu tie ankaŭ propagandos nian Kongreson. F-ino Bernaerts eble iros al Bern kaj tial akceptis provizore tiun komision.

Por la teatraĵo en la Kongreso S-ro Calloens faros la necesan ; pri tio jam envenis diversaj proponoj eĉ el eksterlando. Frato Christiaens proponis eldoni broŝureton je tre favoraj kondiĉoj, titolotan « Apostoleco de la S. koro de Jesuo, Animo de la Katolika Agado » kiun broŝureton ni aldonus al la Kongrespaperoj. Oni ankaŭ decidis post Pasko aranĝi kunvenon en Ostendo, kie nuntempe, same kiel en Okcidenta Flandrujo nia movado brile antaŭeniras. Eble nia vigla grupo el Rumbek ludos teatraĵeton, ekz. Virina Koro (de M. Sabbe, Esperantigita de D. Mortelmans).

La preparolado glate kaj amike disvolviĝis kaj ebligis tralabori grandan tagordon. Ni sentis ke ni faris bonan progreson rilate al la organizo de la Kongreso.

EN LA FUKE-FAMILIO

Kondolencoj.

La 31an de Decembro pie mortis en Mortsel la patrino de nia ano kaj prezidanto de nia grupo tie, S-ro Seghers-Maes. FUKE esprimas al la familio Seghers sian koran kunsenton.

MEDEWERKING!

We vestigen er de aandacht op, dat, om ons orgaan voor ieder interessant te maken, het van belang is dat de lezers zelf eraan medewerken. De verschillende rubrieken bieden een ruime keus. Zendt dus uw artikeltjes,

mededeelingen, vragen, oorspronkelijke of vertaalde gedichten en... originele humor.

Eventuele taalfouten worden door ons gaarne verbeterd.

Redaktie.

D I S T R A P A Ĝ O

Solvo de la enigmo n° 1.

Kopii — Miopa — Vosto — Citro — Cedro — Droni — Kameo — Trafi — Logio — Neono — Reruo — Greno — Konko — E-tapo — Fasti — Kasko — Pramo — Boĝio — Groto..

La grava vero estas : Post domaĝo, venas saĝo.

Por la enigmo no 1 ni ricevis kontentigan nombron de solvoj. no 2 ne estas tiel brila kaj ni esperas ke la amatoroj rapidos post ricevo de tiu ĉi numero tuj ensendi sian solvon.

Dum la kurso de S-ro Calloens okazis la

publika lotumado de la premigajnto. Estis Sinjoro Engels, Armand Segerslei 53, Mortsel, kies nomo oni eltiris. La vendinstituto forsendos al li la Vortaron de Van Straaten. Ni speciale mencias la Katolika Rondo Esperantista Mortsel 'n kiu ensendis bloke la solvon de ĉiuj siaj anoj. Estas imitinda ekzemplo por niaj aliaj grupoj. Ne forgesu ke ni ne nur intencas amuzi niajn gelegantojn per la distra paĝo sed ankaŭ kaj precipe instrui, kaj gajni al ili valoran premion. Ju pli da partoprenantoj, despli belan libron ni povos forlotumi.

VORTĈENENIGMO n° 4.

El la ĉi subaj klarigoj, trovu 16 vortojn kies lasta silabo estas la komenco de la sekvanta vorto, tiamaniere formante vortĉenon :

1. Enloĝanto de eŭropa lando :
2. Ĉiu el ni posedas ĝin :
3. Ne kopiu, sed imitu ĝin :
4. Terura insekto, precipe kiam ili estas amaso :
5. Grava persono portas ĝin :
6. La nura celo de certa ludo :
7. Esperantistoj atentu precipe tion :
8. Estas danĝera post malsano :
9. Multaj el ni faras antaŭ agrabla okazaĵo :

10. Por tiuj kiuj laboris :
11. Simbola kapkovraĵo :
12. Speciala manĝmaniero ĉe certaj bestoj :
13. Patro Noë ion scias pri ĝi :
14. Kion oni neniam tiom faris kiom nuntempe :
15. Fieras pri longa kolo :
16. Rezulto de pratempaj tertremoj :

La solvojn oni ensendu sekretariejen plejlaste la 1-an de Marto.

Bonvole plenumi la konkursajn regulojn.

Premio : Esperdona Islando.

HUMURAĴOJ

LA TRADICIO.

La instruisto estas klariginta al la lernantoj ke tradicio estas tio, kio transpasas de patro al filo.

La sekvantaĵan matenon Johano venas tro malfrue en lernejon. Al la demando de la instruisto pri la kaŭzo li respondas : mi ne povis veni pli frue, majstro, mia patrino devis unue kudri pecon en mia tradicio.

RUZA.

Sinjorino al almozpetanto : Vi estas su-

fiĉe forta kaj sana por labori. Mi ne donas al tiaj homoj.

Almozpetanto : Kaj vi, sinjorino, estas sufiĉe bela por fariĝi filmstelo kaj vi tamen ankaŭ ne faras tion.

La almozpetanto ricevis bonan almozon.

KURAGO.

Instruistino : Mi estas bela virino : kiu tempo estas tio ?

Lernantino : Pasinta tempo, fraŭlino.

Wilt ge steeds veel volk op uw vergaderingen? — Geef een uurtje FILM!

Het Katholiek Smalfilm Studio van Antwerpen biedt U een interessante keuze van **documentair**- speel- en tekenfilms.

Specialiteit van reportages: 17e IJzerbedevaart. Vl. Nat. Zangfeesten. Pater Damiaanfeesten enz. Meer dan 600 referenties.

Vraag gratis uitgebreide geïllustreerde kataloog aan :

KATH. SMALFILM STUDIO, 32, OUDE BEURS, ANTWERPEN

La plej rekomendindaj originalaj

verkoj en Esperanto

estas la verkoj de la plej populara esperantisto-verkisto :

JULIO BAGHY.

Ĉu por distro, ĉu por studo, ĉu por ekzameno, tutegale, liajn verkojn vi legu!

Jen la titoloj kaj prezoj :

	Bind.	Broŝ.
Preter la Vivo ...	Fr. 24.—	Fr. 17.—
Sur sanga tero ...	Fr. 58.—	Fr. 45.—
Verdaj donkilotoj	Fr. 34.—	Fr. 24.—
La vagabondo kan-		
tas	Fr. 26.—	Fr. 16.—
La Verda Koro ...	Fr. 36.—	Fr. 16.50
Printempo en la		
aŭtuno	Fr. —.—	Fr. 12.—
Teatra Korbo	Fr. —.—	Fr. 13.—
Aliaj tre rekomendindaj libroj estas :		
Leerboek voor Esperanto, de		
D-ro F. Szilagyi	Fr. 11.—	
Ellernu, daŭriga kurso, de		
D-ro F. Szilagyi	Fr. 16.—	
Plena Gramatiko de Espe-		
ranto, de K. Kalocsay ...	Fr. 84.—	
Haveblaj ĉe nia Vendinstituto, D. Mortelmans, 14, Egied Segerslaan, Wilrijk. Poŝtĉekkonto No 1194.82.		

ĈIU ESPERANTISTO

nepre havigu al si la plej bonan verkon de nia fama verkistino

1°) MARIE KOENEN, el la ned. lingvo trad. de P. CH. M. v. d. Vijver : *La Sunkrono*. prezo : *belgaj frankoj 13. — broŝ. ; fr. 25. — bind.*

El recenzoj : ... Maar als je eens goed Esperanto wilt lezen, dan kan ik je dit boek aanbevelen... (De Jonge Wacht). ... Bela nova libro kiu entenas bonege tradukitan rakonton..... (La Praktiko). ... La Sun-

' RADIARO '

LINGVA GAZETO KATOLIKA

Monata eldono, 18-paĝa, eldono de

Katolika Esperanto Instru-Centro

JARABONO : 1,75 NED. GULD.

Adm. J. Dercks, Antwerpschestraat, 43
BERGEN-OP-ZOOM (Nederland)

Provnumeron ni sendas senpage.

(Ĉiumonate abonebla).

Beginn reeds te sparen om het schitterend IKUE-kongres te Antwerpen te kunnen bijwonen.

krono en Esperanto estas leginda, eĉ tre leginda libro... (N. K.) Kiel ekzemplo de alta nederlanda literaturo, certe rekomendinda verko (Flandra Katoliko).

2°) *La Najtingalo*, dua eldono. Plej ŝatata Esp. kantaró. La unua eldono finvendiĝis en tri tagoj.

..... mi ne povas ne konsili : tuj aĉetu ĝin kaj kantadu por ke la krizo cedu! (Radiaro). Prezo nur fr. 2,50.

Eldonis : Esperanto Instituto MALNOVA TURO, Eindhoven — Ned. Mendebla pere de nia filialisto D. Mortelmans, E. Segerslaan, 14, Wilrijk. P-konto n° 119.482.

W. J. THIEME & K-io

en Zutphen (Nederlando)

A) Stud-libroj :

ESPERANTO-WOORDENBOEK.

(Esp. - Nederl. & Nederl. - Esp.)

Verkis A. G. J. van Straaten, gvidanto de la Centra Esperanto-Kurso en Nijmegen, membro de la Ned. Esp. Ekzamena Komitato.
En bela bindo : Fr. 80.—

BEKNOPT ESPERANTO-WOORDENBOEK. (Esp.-Ned. & Ned.-Esp.)

de A. G. J. van Straaten
En bela bindo : Fr. 40.—

H. J. Bulthuis, LA JUNA KOMENCANTO.

La plej unua Esp-a legolibreto por kursoj kaj lernejoj (kun klarigoj). En tri partoj.
1-a parto : Fr. 8,25 ; 2-a parto : Fr. 8,25 ; 3-a parto : Fr. 9,—.
Ĉi-tiuj tri sinsekvaj partoj (amplekso resp. 46, 51 kaj 54 paĝoj) estas uzeblaj sen ia alia lernolibro, por hejma studado, kursoj k. t. p.

H. J. Bulthuis, RAPIDE KAJ BONE.

Du legolibretoj (por infanoj), ĉiu ĉ. 60-paĝa, plenaj de belaj bildoj, destinitaj por infanoj. Ili estas tre rekomendindaj ĉie, kie infanoj lernas Esperanton. *Prezo de unu parto : Fr. 9.—*

H. J. Bulthuis, LA JUNA ROBINSONO.

Legolibro kun klarigoj, tre taŭga por junaj Esperantistoj, kiuj intencas poste legi la grandan libron « Robinsono Kruso ». 50 paĝoj kun multaj bildoj. *Prezo : Fr. 10,—*

H. J. Bulthuis, ROBINSON KRUSO.

Legolibro por geknaboj, laŭ Campe. 3-a eldono. Bindita. Kiel « La Juna Robinsono », sed kun pli vasta kaj malpli facila teksto. Kun ilustraĵoj kaj parol-ekzercoj.
Prezo : Fr. 32.—

W. W. van Alphen, ESPERANTO.

Lern- kaj lego-libro por la uzado en lernejoj, kursoj kaj privata studado. Bindita.
Prezo : Fr. 28,70. Slosilo al ĝi : Fr. 10,—

Glück & Willems, LA VERBO EN ESPERANTO.

Teorio kaj praktika uzado *Prezo . Fr. 10,70*

M. de Waard, HET ESPERANTO-A EXAMEN.

Lern- kaj ripetlibro por daŭrigaj kursoj kaj stud-rondoj.
Prezo : Broŝ. Fr. 15,60 Kart. Fr. 19,70.

M. de Waard, HET ESPERANTO B-EXAMEN.

Lern- kaj ripet-libro por daŭrigaj kursoj kaj stud-rondoj.
Prezo : Broŝ. Fr. 45,10. Kart. Fr. 53,30.

M. de Waard, DEMANDARO KAJ RESPONDARO.

pri la historio de la Esperanto-Movado.
Prezo : Broŝ. Fr. 23, — Kart. Fr. 26,25.

M. de Waard, EEN VERZAMELING ESPERANTO SPREEKWOORDEN EN ZEGSWIJZEN.

500 nederlandaj proverboj kun la korespondaj Esp-aj proverboj. Kun indekso de la vortoj.
Prezo : Fr. 14,75

P. J. Soeters, MIA LERNOLIBRO.

Practische methode voor Esperanto.
Prezo : broŝ. Fr. 19,70. Kart. Fr. 23,—

J. J. Rozendal, MI PAROLAS ESPERANTON.

Ekzercoj de lego, traduko kaj parolo, por kursoj, lernejo kaj hejma lernado.
Prezo : Fr. 14,75.

B) Literaturo :

(Bonaj libroj kun grave malaltigitaj prezoj).

H. J. Bulthuis, KRESTOMATIO.

Simpla legolibro kun klarigoj ; entenas fragmentojn el pluraj Esp-aj romanoj k. t. p. Tre taŭga por tiuj, kiuj jam legis la libron « Robinsono » kaj volas plu progresi en Esperanto. Ĝi donas ankaŭ rigardon super la ekzistanta Esperanto-literaturo.
Antaŭa prezo : Fr. 57,40 broŝ. ; Fr. 69,70 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 40,— bind.

* H. Conscience, LA LEONO DE FLANDRUJO.

El la flandra ligvo tradukis H. J. Bulthuis. Rekomendita de la Esp-ista Literatura Asocio.

Antaŭa prezo : Fr. 53,30 broŝ. ; Fr. 61,50 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

Charlotte Brontë, JANE EYRE.

El la angla lingvo tradukis H. J. Bulthuis, ano de la Esp-ista Lingva Komitato.

Antaŭa prezo : Fr. 86,10 broŝ. ; Fr. 96,75 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

« La bela esperanta traduko pruvas, ke la tradukinto majstras la mondlingvon. Tial ĝi plene meritas esti legata kaj pristudata ». (Kath. Schoolblad).

Hendrik Ibsen, IMPERiestro kaj GALILEANO.

Mond-historia teatraĵo, tradukita de H. J. Bulthuis L. K.-ano. Rekomendita de la Esp-ista Literatura Asocio.

Antaŭa prezo : Fr. 57,40 broŝ. ; Fr. 64,— bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

* J. v. d. Vondel, GIJSBRECHT VAN AEMSTEL.

La detruo de la urbo kaj lia ekzilo. Trage-

dio. El la nederlanda lingva originalo tradukis Ir. J. R. G. Isbrücker, membro de la Esp-ista Akademio.

Antaŭa prezo : Fr. 32.— broŝ. ; Fr. 41.— bind.

Nuna prezo : Fr. 16,40 broŝ. ; Fr. 24,60 bind.

« Cervantes en sia verko « Don Quijote » komparas la tradukaĵon kun la dorsa flanko de la teksita tapiŝo ; oni ja rekonas la figurojn de la teksto, sed ĉie elpendas faden-finaĵoj. Sed ĉe tiu ĉi tradukaĵo ne trafas la komparo de Cervantes : malgraŭ la malfacilaĵoj ; kiuj trudiĝis al la tradukanto, la libro staras sur la nivelo de la originalo, la famaj horoj vekas la saman impreson de kortuŝa simpleco, kiel en la originalo ». (Weekblad voor Gymn. & M. O.)

* Homeros, ODUSSEIAS.

El la antikva greka lingvo tradukis W. A. J. Manders.

Antaŭa prezo : Fr. 64,— broŝ. ; Fr. 76,25 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 34,50 bind.

« S-ro Manders per ĉi-tiu traduko pruvas la grandan riĉecon kaj flekseblecon de la belsona Esperanto. Ĝi precize redonas la plej delikatajn nuancojn, kaj oni havas la impreson legi la originalan tekston de la senmorta eposo de la granda greka poeto. Oni ne povas sufiĉe varme rekomendi la libron ». « Het Laatste Nieuws, Brussel ».

La libroj signitaj per steleto estas en la listo de tiuj libroj, el kiuj la kandidatoj por la B-ekzameno devas legi almenaŭ 4 librojn.

La supre menciitaj libroj estas aĉeteblaj ĉe la Vendinstituto de F. U. K. E., D. Mortelmans, 14, Egied Segerslaan, Wilrijk. Poŝtĉekkonto n° 119482., kiu estas la filialisto por Flandrujo de la Firmo W. J. Thieme & Co, Zutphen.

La libroj estas sendataj afrankite.

POR DISTRA HORO

la plej taŭgaj libroj en Esperanto estas

la "EPOKO"-libroj

La libroj enhavas interesajn, malenuigajn romanojn.
Ĉiu libro enhavas 192 paĝojn, laŭ formato 18 x 11.5 cm.
Preso klara — bindo kartona — papero bonkvalita

1. MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO. Agatha Christie.
El la angla originalo tradukis « Etulo ».
2. LA KNABOJ DE PAŬLO-STRATO. F. Molnar.
El la hungara originalo tradukis L. Spierer.
3. LA PRINCO KAJ BETTY. P. G. Wodehouse.
El la angla originalo tradukis G. Badash.
4. LA TEMPO-MASINO. H. G. Wells.
El la angla originalo tradukis E. W. Amos.
5. PRINCINO DE MARSO. Edgar Rice Burroughs.
El la usona originalo tradukis K. R. C. Sturmer.
6. COLOMBA. Prosper Mérimée.
El la franca originalo tradukis Prof. J. Beau.

Prezo de ĉiu libro Fr. 12.—, afrankite.
La ses libroj kune por Fr. 65.—, afrankite.

Eldonitaj de THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, LTD., ANGLUJO.
Mendu ĉe F.U.K.E., 14, Egied Segerslaan, Wilrijk.

FLANDRAJ
ESPERANTISTOJ



EN ROESELARE
ESTAS LA DE VI
PREFERATA

PRESEJO
H. & H. BRAEKEVELT
Statiedreef, 177 - Tel. 1080


Iedere groep, vereeniging of zakenman gebruike vóór elk order onzen dienst voor inlichtingen en schetsen.

Specialiteit :
ESPERANTO - DRUKWERK

Imperial

Schrijfmachiënen zijn de beste

Engelsch



Fabrikaat

Bureelmodel & draagbaar model
ROESTVRIJ

Het meest MODERNE Schrijfmachiënen
2 JAAR WAARBORG

Eerste klas schrijflinten voor alle merken van schrijfmachiënen & rekenmachiënen. - Ellam's carbonpapier - Ellam's duplicatoren, stencils en inkten.

Bijzonder werkhuis voor herstellingen aan alle schrijf- en rekenmachiënen.

TOBIE DE PRINS Tel. 216.20
● 32, Kathelijnevest, ANTWERPEN ●